

M. 15149: 1-2.

(översättv. 1 sida)

Tyskland

uppl. år 1952

Uav i LM F 85 nö. hästhöll och hästslakt m. m.

s. 1-2.

56

Tyskland

M. 15149:1

FOLKLIVSARKIVET  
Institutionen för folklivsforsk-  
ning vid Lunds universitet

Kurt Dölling.

Lippstadt (Vestfalio), la 15<sup>a</sup> de junio 1952.

Möllerstrasse 4.

Al la

Universitato de Lund

Etnologia Arkivo

Finngatan 8

L u n d

Svedujo

Koncernas esploron pri buĉado de ĉevaloj kaj manĝado de ĉevalviando.

En sia numero 6 de 1.4.1952 la revuo "Heroldo" sub la titolo "Grava alvoko de Universitato Lund" konsilas al la legantaro respondi al vi 4 demandojn pri buĉado de ĉevaloj kaj manĝado de ĉevalviando. Pro tio mi sciigas al vi jenan:

Mia hejmurbo Lippstadt situas en Vestfalio (okcidenta Germanujo).

Pri la demando 1:

Ĉi tie la manĝado de ĉevalviando ĝenerale ne estas ŝatata, oni opinias ĝin malplivalora. Sole parto de la malriĉa loĝantaro aĉetas ĝin, ĉar ĝi estas pli malmultekosta ol alia viando. La plej granda parto de la loĝantaro eĉ abomenas la ĉevalviandon. Tion oni eble povas klarigi per tio, ke la vestfaliaj homoj plejparte estas idoj de la "malnovaj malsupraj Saksoj", al kiuj la ĉevalo estis sankta kaj kiuj la manĝadon de ĉevalviando severe malpermesis. Eble la jenaj nombroj interesas:

Antaŭ 50 jaroj, kiam Lippstadt ankoraŭ havis 6000 loĝantojn, estis buĉataj jare 60 - 70 ĉevaloj. Hodiaŭ ĉe loĝantaro de 30 000 estas buĉataj jare 350 - 400 ĉevaloj. Tiu nombroj montras, ke la konsumo de ĉevalviando ĝis nun relative ne ~~pl~~ plialtiĝis. Cetere parto de la ĉevalviando estas vendata al najbaraj industriaj grandurboj.

Pri demando 2:

La buĉado de ĉevaloj ne kaŭzis nek kaŭzas socialan malhonoron, sed tamen tiaj buĉistoj ne estas akceptataj same kiel aliaj metiistoj.

Pri demando 3:

*[Handwritten marks]*

Pri demando 3:

Ekzistas ĉi tie unu speciala profesia ĉevalbuĉisto. Alia speciala persono pri mortigado de hundoj kaj katoj ĉi tie ne ekzistas.

Pri demando 4:

La ĉevaloj estas buĉataj en la ĉi tiea urba buĉdomo, sed en aparta ejo. Ilia buĉado en iu alia halo, kie estas buĉataj bovoj, porkoj ktp., estas malpermesita. La mortigado de ĉevaloj okazas same kiel tiu de aliaj bestoj. Oni senkonsciigas ilin, pafante en la kapon per bolto-pafaparato. Poste oni elfluigas la sangon, tranĉante la gorgon.

Esperante, ke miaj sciigoj ĉi-supraj utilu al vi, mi salutas

*Kurt Hilling*

Postskribo: Ĉu malgraŭ multe da laboro vi eblas sciigi al mi pri la utileco de mia letero? Mi kore dankus!

(56)

Ang. hästslaktning och förtärande av hästkött.

1. Här är förtärande av hästkött vanligen inte uppskattat. Man anser det mindervärdigt. Endast en del av den fattiga befolkningen köper det, ty det är billigare än annat kött. Största delen av befolkningen t.o.m. avskyr hästkött. Det kan man möjligen förklara därmed, att vestfalerna till största delen är avkomlingar av de gamla sachsarna, för vilka hästen var helig och vilka strängt förbjöd förtärande av hästkött. Följande siffror kan möjligen intressera:  
För 50 år sedan, när Lippstadt ännu hade 6000 innevånare slaktades per år 60 - 70 hästar. I dag med en befolkning på 30.000 slaktas årligen 350 - 400 hästar. Dessa siffror visar, att konsumtionen av hästkött hittills inte har ökats. För övrigt säljes en del av hästköttet till närbelägna industristäder.
2. Slaktandet av hästar varken har förorsakat eller förorsakar social vanheder, men likväl accepteras inte dessa slaktare på samma sätt som andra yrkesmän.
3. Det finns här en speciell yrkeshästslaktare. Någon sär skild person för dödande av hundar och katter finns inte här.
4. Hästarna slaktas i härvarande stadsslakthus, men i en särskild lokal. Att slakta dem i en annan lokal, där oxar, svin etc. slaktas, är förbjudet. Slaktandet av hästar äger rum på samma sätt som av andra djur. Man bedövar dem, i det man skjuter dem i huvudet medelst en bult. Därefter låter man blodet rinna ut, i det man skär i strupen.

Kurt Dölling.